

Johann Wolfgang von Goethe, Johann Wolfgang von Goethe, Johann Wolfgang von Goethe,

Trovaĵo

Trovita

Gefunden

tradukita de Richard Schulz *tradukita de Antoni Grabowski*

Mi vagis sola
En la arbar'.
Nenion serĉi
Jen mia far'.

Mi foje arbaron
Promene eniris,
Kaj serĉi nenion
En penso deziris.

Ich ging im Walde
So für mich hin,
Und nichts zu suchen,
Das war mein Sinn.

Enombre vidis
Floreton mi.
Lumanta stelo,
Okulvizi'.

Mi vidis, en ombro
Jen staras floreto:
Steleto lumanta
Aŭ blu-okuleto.

Im Schatten sah ich
Ein Blümchen stehn,
Wie Sterne leuchtend,
Wie Äuglein schön.

Al mi plukonta
Jen ĝia vort':
„Ĉu ke mi velku
Al frua mort' ?“

Mi volis ĝin ŝiri,
Sed plore ĝi diras:
“Ĉu por ke mi velku,
Vi tial min ŝiras?”

Ich wollt' es brechen,
Da sagt' es fein:
„Soll ich zum Welken
Gebrochen sein?“

Mi ĝin elfosis
Kun la radik'
Ĝin portis domon
Al la larik'.

Do mi ĝin elfosis
Kun radikareto,
Kaj portis al mia
Ĝarden' ĉe l' dometo.

Ich grub's mit allen
Den Würzlein aus,
Zum Garten trug ich's,
Am hübschen Haus.

Replantis tie
Ĝin en la fru'.
Ĝi nun kreskadas
Kaj floras plu.

En loko trankvila
Plantite karese,
Ĝi kreskas, burĝonas,
Kaj floras senĉese.

Und pflanzt' es wieder
Am stillen Ort;
Nun zweigt es immer
Und blüht so fort.

...

...

...

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 - †1997-09-26) en 1984-07.*

Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)

Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj“, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).*

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).*

Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)